

Amálie Kutinová kaj ŝiaj kuraciloj kontraŭ ĉiuj suferadoj

Oldřich Arnošt Fischer

Antaŭ cento da jaroj, la 22-an de junio 1898, en multenombra familio de lerneja direktoro *Jan Tauber* en vilaĝo *Rouchovany* naskiĝis lia filino *Amálie*. Knabino *Málinka* - kio estis hejma nomo de *Amálie* - estis denaske subtila kaj tre sentema. Ekde kvar jaroj de ŝia aĝo *Málinka* loĝis en valaĥa vilaĝo *Štítná* super *Vlára*. Ŝia patro tie estis lernejestro. Li zorgis ankaŭ pri preĝeja ĥoro kaj apartenis al estimataj elstaruloj de loka publika vivo. El fratinoj proksimiĝis al *Málinka* per ŝia aĝo nur iomete pli aĝa *Gabriela* (hejme nomata *Gabra*). Ambaŭ knabinoj, kiuj kreis nedisigeblan duopon, travivis feliĉan infanaĝon kaj estadis surverŝitaj per amo de iliaj gepatroj, avino kaj gefratoj.

Bonkorulino *Málinka* interesiĝis pri la naturo kunsentinte kun ĉiu vivanta kreituro. Ŝi ŝatis kolektigi kuracherbojn kaj provadis kuracigi ŝian avinon kaj aliajn familianojn. Supozeble tiun intereson vekigis je ŝi aŭ instruisto *Macek* aŭ saĝaj spicistinoj. Sapiro pri helpado al malsanuloj alkondukis *Málinka*-n al studado en la Farmacia Fakultato de la Karola Universitato en Prago. Kiel farmaciistino ŝi pli poste laboris en apotekoj de Prago, *Tábor*, *Kostelec* super *Orlice*, *Křinec* ĉe *Nymburk* kaj aliloke.

Ŝia renkontiĝo kun inĝeniero *Jan Kutina*, praga eldonisto, estis feliĉa. Viron, kies vivodevo estis enmondigado de novaj libroj, ŝi elektis ŝian vivpartneron.

Amálie Kutinová, kiu plenan sian vivon nostalgiiis pri Valaĥio, ekmetis siajn rememorojn en siajn librojn kaj rakontojn. Ŝian unuan sukcesan libron por infanoj „*Gabra* kaj *Málinka*, bravaj knabinoj“ („*Gabra a Málinka, povedené dcérky*“, 1935) sekvis libraro, en kiu ŝi rakontis pri infaneco kaj adoleskanteco de ŝi mem kaj *Gabra*. Origine ŝi volis verki libron „Nia patrino“ („*Naše matička*“), en kiu ŝi glorigus sian amatan patrinon, sed dum verkado desub ŝia plumo ĉiam pli kaj pli ekaperis kapo de ŝia frivola fratino *Gabra*, kiu kreadis sanan kontraŭpolon de iam eĉ tro sentema *Málinka*. Tial ĝis nun vivas sur papero geknaboj de *Štítná*, propranatura preĝejservisto *Struhař*, karesa pastro *Filip*, instruisto *Macek* kaj multe da aliaj personoj, kiujn apotekistino, kiu modeste diris pri ŝi mem, ke ŝi ne estas verkistino, sed nur protokolistino, pentris kun eksterordinara konscienco kaj amo. Ŝia infaneco – tio estis vilaĝo *Štítná* kun rojo *Járek*, preĝejo de Sankta Jozefo, ciganoj loĝantaj apud vojo kondukanta en *Bylnice*-n, hundoj *Šohaj* kaj *Rón*, virkato *Macek*, kapro *Herka* ...

Legantoj de libroj de *Amálie Kutinová* aprezas nek nur priskribon de folkloro de komenco de la dudeka jarcento nek nur kernecan valaĥan dialekton, kiun uzadas multe da parolantaj personoj de ŝiaj libroj, sed ion alian. Eĉ nuntempe ni ne retenas nian admiron de edukitaj kaj neostente piaj membroj de instruista familio. Tio ne estas plaĉa rakonto pri ĝojaj aventuroj de petolantaj infanoj, sed aspekton de la mondo rigardatan per infanaj okuloj, kiuj estas atentemaj ankaŭ al homoj, kiuj estas malriĉaj, forlasitaj, malsanaj kaj malfeliĉaj. Kiel oni povas helpi al ili? **Kontraŭ ĉiu malsano kaj ĉiu suferado tamen devas ekzisti iu kuracilo!** *Gabra* kaj *Málinka* renkontiĝas ankaŭ konfuzojn, kiujn alportas ilia adoleskanteco. Ankaŭ idealoj pri apotekista laboro de *Málinka* estis submetitaj al malfacila ekzameno, kiam juna apotekistino ekkonfliktiĝis je ŝia malvasthorizonta,

senkompata ĉefo, kiu pensis nur pri sia propra profito (novelo „Farmaciistino“, „Farmaceutka“, 1947). En tiuj momentoj *Amálie Kutinová* serĉis apogon en rememoroj pri sia familio, en kiu ŝi kreskadis.

Kiam ŝi laboris en *Křinec* ĉe *Nymburk*, bonkorula taksa oficisto alportis al ŝi grandajn maplenajn budĝetajn librojn. Juna apotekistino ekĝojis: „Tio estos bonega por mia verkado! Kolonoj min ne ĝenos, ĉar verkisto kontadas siajn „li devas pagi“ – „li pagis“ uzante monon, kiun estas degandeva per neniu taksa oficejo.“ Kaj baldaŭ inter kolonoj de budĝetaj libroj kun sigeloj „Taksa Administraro *Nymburk*“ naskiĝis rakontaro „Niaj pacientoj“ („*Naši pacienti*“, 1946, 1947).

En libroj de *Amálie Kutinová* oni povas senti ankaŭ amon al la patrio kaj estimo al ĝia historio. Same kiel Valaĥion *Kutinová* amis Pragon, Elboregionon kaj ankaŭ Gigantmontaron (Karkonoŝon), kie ŝi trovis sian duan hejmon. Post la dua mondmilito ŝi en Gigantmontaro dediĉis al konado de loka folkloro. Ŝi prezentiĝis en radiaj programoj kaj verkis artikolojn publikitajn en diversaj ĵurnaloj. Ŝi eldonis 21 librojn kaj tri kantaretojn de infanaj kantoj. Pli poste al ŝi helpis ŝia filino, verkistino *Mária Kubátová*. Dum ŝia plena labora agado ŝi forpasis en urbeto *Vrchlabí* la 30-an de marto 1965.

Fatoj de ŝiaj libroj estis interesaj. Tiuj libroj ne devis esti eldonataj post la dua mondmilito, sed spite de tio ili tiam estis ofte legataj. Ankaŭ post la jaro 1968 tielnomataj „motivoj, kiuj estis neakcepteblaj de ideologia vidpunkto“ ne eskapis atenton de gardemaj komunistaj cenzoristoj; pro tio la 3-a kaj la 4-a volumoj de „*Gabra kaj Málinka*“ povis esti postmilito eldonita nur en mallongigaj formoj kaj la 5-a kaj la 6-a volumoj tute ne devis esti eldonitaj.

Amálie Kutinová estis verkistino, kies verkaĵo neniam estis montrita en lernejoj legolibroj, sed spite de tio ĝi sukcesis ravidu infanojn de kelkaj generacioj. Ĝis nun oni povas trovi duondisfalitajn presaĵojn de „*Gabra kaj Málinka*“ devenantajn de la 30-aj kaj la 40-aj jaroj de la dudeka jarcento. Bona verkaĵo, kiu estas plena de la amo al homaro ne perdiĝis. Ĝi ĉiam alportas al ni mesaĝon, ke pli karesa mondo estas klopodenda.

(Tiu artikolo estis ĉeĥlingve publikita en politika ĵurnalo *Hlas* (Voĉo) de Kristana Demokrata Unio – Ĉeĥoslovaka Popola Partio en la jaro 1998. Esperantigis ĝin ĝia aŭtoro.)